

La Letero de Barnabas

El la Greka tradukita de Gerrit Isai Berveling

Broŝure:

La letero de Barnabas

El la Greka tradukita de Gerrit Isai Berveling

Voĉoj Kristanaj 37

VoKo, Rijswijk 2020

(planita)

Interrete:

La originala Greka teksto:

https://www.ccel.org/1/lake/fathers/barnabas_a.htm

Lastfoje kontrolita: 2020-04-26. La retpaĝo ne ĉiam alireblas.

La Letero de Barnabas

Επιστολή Βαρνάβα

Saluto

1:1 Saluton en paco, filoj kaj filinoj, en la nomo de la Sinjoro, kiu amis nin.

Intenco de la letero

2 Ĉar la fruktoj de la justigo de Dio al ni estas multaj kaj riĉaj, pro tio superabunde mi ĝojas pri viaj feliĉaj kaj benataj spiritoj, ĉar tiel funde vi ricevis la donacon de spirita graco. 3 Tial mi ankaŭ des pli gratulas min mem pri la espero saviĝi, ĉar vere mi vidas en vi, kiel la Spirito elverŝiĝis sur vin de la Sinjoro, kiu riĉas en amo. Ke vin – tiom sopiratajn – mi vidis, tiom plenigis min per ĝoja miro pri vi. 4 Do plene konvinkita kaj interne certa¹, ke, post kiam inter vi mi parolis, mi nun scias, ke la Sinjoro akompanis min en la vojo de l' justeco, kaj ankaŭ tial mi estas devigita ami vin pli ol mian propran animon, ĉar granda fido kaj granda amo loĝas en vi *en espero je la vivo*², kiun li promesis. 5 Tion konsiderante, do, ke, se mi zorgus transdoni al vi pecon de kion mi ricevis, tio montriĝus al mi sufiĉa rekompenco, se mi servas al tiaj spiritoj, mi hastis mallonge skribi al vi, por ke krom via fido vi ankaŭ ekhavu perfektan scion.

¹ La konstruo de ĉi frazo ne estas klara.

² Tito 1:2; 3:7.

Resumo de la kristana fido

6 Estas ja tri ordonoj de la Sinjoro: la espero de la vivo, kiu estas komenco kaj fino de nia fido; kaj la justeco, komenco kaj fino de la juĝo; kaj la amo je la ĝojo kaj jubilo, kiuj atestas pri la agoj de l' justeco. 7 Ĉar per la profetoj la Sinjoro konigis al ni ĉion pasintan kaj estontan, kaj li do donis al ni ankaŭ unuaĵojn por gustumi el ĉio estonta. Se unuope ĉion ĉi ni vidas realiĝi, kiel ĉion li antaŭdiris, ni do devos kun pli da riĉa fido kaj kun pli da ekzaltiĝo alproksimiĝi al li en timo antaŭ li. 8 Kaj mi ne kiel <via> instruisto, sed kiel unu el inter vi montros al vi kelkajn aferojn, per kiuj en ĉi momento vi des pli ekĝojos.

Malfacila tempo: kontraŭ la Judaj oferoj

2:1 Ĉar la nunaj tagoj estas malbonaj kaj Satano posedas la potencon ĉi-monde, ni devos gardi nin mem kaj serĉi la ordonojn de la Sinjoro. 2 Helpas nin ĉe nia fido la timo antaŭ la Sinjoro, la pacienco, kaj niaflanke batalas toleremo kaj sinregado; 3 se tio restas pura koncerne la Sinjoron, kune kunĝojos ankaŭ la saĝeco, kompreno, scienco kaj scio. 4 Li ja klare montris al ni per ĉiuj profetoj, ke nek oferojn nek holokaŭstojn³ nek donacojn Li bezonas, dirante al ni: 5 *Por kio Mi bezonas vian multegon da buĉferoj? – diras la Sinjoro – Mi trosatiĝis de la bruloferoj de ŝafoj kaj de la sebo de grasigitaj brutoj, kaj la sangon de bovoj kaj ŝafidoj kaj kaproj Mi ne deziras, kiam vi venas por aperi antaŭ Mia vizaĝo. Kiu postulas tion de viaj manoj? Paŝi sur mia korto, tion vi ne plu entreprenu! Se puran tritikon vi alportas – stultaĵo! via oferaĵo estas por Mi abomendindaĵo; viajn novlunojn kaj sabatojn Mi ne eltenas⁴.*

La ofero de la kristano ne manfarita

6 Ĉion ĉi Li do abolis, por ke la nova Leĝo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu ne havas la jugon de la devigo, estu sen homfarita oferado. 7 Kaj Li

³ Holokaŭsto – ofero, kiun post la oferado oni komplete forbruligas. Kutime ĉe oferoj poste la piuloj kvazaŭ kunmanĝis kun la Dio. Zamenhof tradukis per brulofero.

⁴ Jesaja 1:11-13.

ankaŭ diras al ili: *Mi ja ne ordonis al viaj patroj dum la foriro el Egiptujo: donu al Mi holokaŭstojn kaj buĉoferojn!?* 8 Sed nur ĉi tion Mi ordonis al ili: *Neniu el vi intencu en via koro malbonon unu kontraŭ la alia, kaj vi ne amu mensogan ĵuron*⁵.

9 Ni devos kompreni (ni ja havas juĝkapablon) la bonvolan intencon de nia Patro, ĉar, intencante, ke ni ne erarvoju kiel tiuj ĉi, Li diras al ni, ke ni serĉu, kiel ni devos alproksimiĝi al Li. 10 Al ni Li do jene diras: *Oferdonoj al Dio estas spirito suferanta;odoro plaĉa al la Sinjoro estas koro, kiu gloras sian Farinton*⁶. Tial, fratoj, ni devas tre zorgeme trakti pri nia saviĝo, por ke la Malbona⁷, kaŝe enrudiginte ĉe ni, ne forkatapultu nin el nia <vera> vivo.

La fasto, kiu plaĉas al Dio

3:1 Li ree parolas al ili pri tio: Kial vi fastas por Mi, diras la Sinjoro, tiel ke hodiaŭ via voĉo estas aŭdata en kriegoj? Ne tian faston Mi elektis, diras la Sinjoro, nek homon, kiu turmentas sian animon. 2 Nek ke vian kolon vi klinu kiel kanon, kaj vestu vin en sakaĵo kaj sternu cindron sub vi, nek ke tion vi nomu faston, kiu plaĉas al Mi⁸. 3 Al ni Li diras: Jen tiu estas la fasto, kiu plaĉas al Mi, diras la Sinjoro: disŝiru ĉiun ligilon de maljusto, disbatu la katenojn de perfortaj komercaj traktatoj, forsendu la subpremitojn en libereco kaj neniigu ĉiun maljustan kontrakton. Disrompu vian panon por malsatuloj, kaj se nudulon vi vidas, vestu lin; senhejmulojn enkonduku en vian domon, kaj se mizerulon vi vidas, ne malŝatu lin, nek <turnu vin for> de viaj propraj samkarnuloj. 4 Tiam via lumo ekbrilos kiel matenuro, kaj viaj vestaĵoj⁹ rapide progresos; via justeco iros antaŭ vi; la gloro de Dio ĉirkaŭos vin. 5 Tiam vi vokos, kaj Dio aŭskultos vin, kaj dum ankoraŭ vi parolos, Li diros: Jen Mi estas! Kondiĉe, ke vi forigos el inter vi premadon, montradon per fingro, kaj

⁵ Jeremia 7:22-23. Zeharja 8:17.

⁶ Laŭ Psalmo 51:17.

⁷ = la Diablo.

⁸ Laŭ Jesaja 58:4-5.

⁹ La Biblia teksto diras: via saniĝo.

paroladon malbonan, kaj al malsatulo donos vian panon elkore, kaj kompatos suferantan animon¹⁰.

6 Pro tio, do, fratoj, Li estas longpacienca, antaŭvidante, kiel la popolo, kiun Li preparis, en senmalico fidos Lia amatan Filon, ĉar Li anticipe malkaŝis al ni ĉion, por ke ni ne haste alkuru kvazaŭ prozelitoj <por akcepti> ilian Leĝon.

Ni fuĝu de ĉio malbona; alproksimiĝas la fino de la tempoj.

4:1 Ni, kiuj tiom serĉadas pri la okazontaĵoj, ni do devas diligente serĉi, kio povos savi nin. Ni do komplete fuĝu for de ĉiu ago de maljusto, por ke la agoj de maljusto ne ekposedu nin; kaj ni malamu la erarvojaĝadon de la nuna tempo, por ke ni estu amataj en la estonto. 2 Ni do ne ellasu la bridojn de nia animo, tiel ke ĝi povu vetkuradi kune kun la pekuloj kaj malbonuloj, por ke ni ne fariĝu similaj al ili. 3 La fina stumbloŝtomo (aŭ danĝerloko) alproksimiĝis, pri kiel estas skribite, kiel diras Henoĥ¹¹: Ĉar tiucele la Sinjoro mallongigis la tempojn kaj la tagojn, por ke Lia Amato hastu kaj venu al sia heredaĵo. 4 Kaj la profeto diras: *Dek reĝecoj regos sur la tero, kaj poste ekstaros malgranda reĝo, kiu faligos tri el la reĝoj sub unu*¹². 5 Pri la sama diras Daniel: *Kaj mi vidis la kvaran beston, teruran, monstran, kaj pli fortan ol ĉiuj bestoj de la maro, kaj el ĝi aperis dek kornoj, kaj el tiuj malgranda korno kiel ŝoso, kaj tri el la grandaj kornoj ĝi submetis sub unu*¹³. 6 Estas do via devo kompreni.

La Interligo estas nia

Ankoraŭ unu aferon mi demandas vin, estante unu el vi, kaj amante vin unuope kaj vin ĉiujn pli ol mian animon: ke nun vi atentu pri vi mem kaj ke vi ne estu similaj al kelkaj, kiuj akumulas siajn pekojn dirante, ke la Interligo estas kaj ilia kaj nia. 7 La nia – certe jes! Sed ili tiel komplete

¹⁰ Laŭ Jesaja 58:6-10.

¹¹ La Esperanto-biblio diras Ĥanoĥ. Povas esti cito el apokrifa aŭ duakanona teksto.

¹² Daniel 7:24.

¹³ Daniel 7:7-8.

perdis ĝin, post kiam de Moseo ili ricevis ĝin. Ĉar jen diras la Skribo: *Moseo fastis sur la monto kvardek tagojn kaj kvardek noktojn kaj li ricevis la Interligon de la Sinjoro, tabelojn ŝtonajn skribitajn per la fingro de la mano de l' Sinjoro*¹⁴. 8 Sed fortunante sin al la idoloj, ili perdis ĝin. Ĉar jen diras la Sinjoro: *Moseo, Moseo, iru rapide malsupren, ĉar via popolo, kiun vi elkondukis el Egiptujo, malvirtigis*¹⁵. Kaj Moseo komprenis <tion> kaj frakasis la du tabelojn el siaj manoj; kaj ilia Interligo rompiĝis, tiel ke tiu de Lia amata Jesuo estu sigelita en nian koron en la espero, kiu venas el la fido je li.

Ne sufiĉas havi la Interligon: Izrael kiel averto por la popolo Kristana

9 Multon mi deziras skribi, ne kiel via instruisto, sed kiel decas al iu, kiu amas ne perfidi, kion ni posedas; tial mi hastas skribi, kvazaŭ balaaĵo via¹⁶. En ĉi lastaj tagoj ni serioze atentu, ĉar la tuta daŭro de nia vivo kaj de nia fido ne utilos al ni, se nun, en ĉi krima tempo, ni ne kontraŭstaros al la venonaj skandaloj, kiel decas al filoj de Dio.

10 La Nigra¹⁷ ne trovu eblon eniri; ni do fuĝu for de ĉiu malsaĝeco, ni absolute malamu la agojn de la malbona vojo. Ne vivu aparte, retiriĝante en vin mem, kvazaŭ jam justigitaj, sed kuniĝu kaj serĉu komune, kio por la tuto konvenas. 11 Ĉar la Skribo diras: *Ve al tiuj, kiuj estas saĝuloj en siaj okuloj kaj antaŭ si mem estas kompetentuloj*¹⁸! Ni fariĝu spiritaj, ni fariĝu perfekta templo por Dio. Kiom dependas de ni, ni zorgu pri timo antaŭ Dio kaj ni batalu, gardi Liajn ordonojn, por ke ni ĝoju en Liaj justigoj.

12 La Sinjoro juĝos la mondon sen konsidero pri la persono. Ĉiu ricevos laŭ tio, kion li faris. Se li estis bona, lia justeco promenos antaŭ li; sed se malbona, la rekompenco de lia malbono estos antaŭ li. 13 Atentu, ke ni ne, ripozante kvazaŭ vokitoj, ekdormu super niaj pekoj, ĉar tiam la

¹⁴ Eliro 31:18; 34:28.

¹⁵ Eliro 32:7.

¹⁶ Ĉu aludo al 1 Korintoj 4:13?

¹⁷ = la Diablo.

¹⁸ Jesaja 5:21.

Malbona Princo¹⁹ ekprenos potencon pri ni kaj forpelos nin el la Regno de la Sinjoro.

14 Des pli, miaj fratoj kaj fratinoj, pripensu tion ĉi: vidu ja, post tiom da grandaj signoj kaj mirakloj, kiuj okazis meze de Izrael, fine tamen ili estis abandonitaj. Estu ni do atentaj, ke <ne plenumiĝu> al ni, kiel estas skribite: *Multaj ja estas la vokitoj, sed malmultas la elektitoj*²⁰.

La nova Interligo

5:1 Ĉar tiucele la Sinjoro eltenis <la Pasionon> por transdoni sian karnon al perejo, por ke per pardono de niaj pekoj ni sanktiĝu, kio estas ĉe la priverŝado de lia sango²¹. 2 Ĉar pri li estas skribite, parte koncerne Izraelon, parte koncerne nin. Tiel <la Skribo> ja diras: *Li estis vundita pro niaj pekoj, dispremita pro niaj krimoj; per liaj kontuzaĵoj ni saniĝis. Kiel ŝafido li estis kondukata al buĉo kaj kiel ŝafo muta antaŭ sia tondanto*²².

3 Tial ni devas esti plej dankemaj al la Sinjoro, ke li sciigis al ni pri la pasintaĵoj, pri la estantaĵoj li saĝigis nin, kaj koncerne la estontaĵojn li ne lasis nin sensciaj. 4 La Skribo ja diras: *Ne vane estas metataj retoj antaŭ birdoj*²³. Tio signifas, ke prave pereas la homo, kiu havante scion pri la vojo de la justeco, foriras en la vojon de la mallumo.

Kial la Sinjoro suferis en la karno

5 Ankoraŭ ĉi tion, miaj fratoj: Se la Sinjoro eltenis suferi pro nia animo, kvankam li mem estas la Sinjoro de la tuta kosmo, al kiu ĉe la kreo de la kosmo Dio diris: *Ni kreu homon laŭ bildo kaj laŭ simileco Nia*²⁴, kial li do eltenis suferi sub la mano de la homoj? Eksciu ĝin. 6 La profetoj, kiuj ricevis la gracon de li, profetis koncerne lin. Kaj li mem, por neniigi la

¹⁹ = la Diablo.

²⁰ Mateo 22:14.

²¹ Ĉu mistera indiko de la bapto?

²² Jesaja 53:5.7.

²³ Sentencoj 1:17.

²⁴ Genezo 1:26.

morton kaj por demonstri la resurekton el la morto, ĉar estis necese, ke li aperu en la karno, li suferis <kion li suferis>, 7 por ke li plenumu la promeson faritan al la patroj kaj por ke li montru, dum ankoraŭ surtere li preparis novan popolon por si mem, ke ĉar li mem estigis la resurekton <de la homoj>, li ankaŭ fariĝos ilia juĝisto. 8 Krome, instruante Izraelon kaj farante tiom da kaj tiel grandajn miraklojn kaj signojn, li predikis kaj li superŝutis ĝin per sia amo. 9 Sed kiam siajn apostolojn li elektis, kiuj devos mesaĝi lian evangelion, pekemajn homojn super ĉiu peko, por ke li montru, ke *mi venis voki ne la justulojn, sed la pekulojn*²⁵, tiam li klare montris sin esti Filo de Dio. 10 Ĉar se li ne venus en la karno, kiel do la homoj estu savitaj rigardante lin, kiam eĉ la sunon, kiu ja malaperos – verkon de liaj manoj –, la homoj ne kapablas alrigardi rekte rigardante en ties radiojn? 11 Ĉu la Filo de Dio do ne tiucele venis en la karno, por ke li konduku al pleneco la sumon de iliaj pekoj, kiuj persekutis liajn profetojn ĝismorte? 12 Ĉu do ne tiucele li eltenis? Dio ja diras, ke la vundo de lia karno venis de ili: *Kiam ilian paŝtiston oni mortigas, tiam pereas la ŝafoj de la greĝo*²⁶.

13 Li mem do deziris tiel suferi; ĉar nenece estis, ke li suferu sur la ligno. Ĉar kiu profetas, tiu diras pri li: *Savu mian animon de la glavo*²⁷ kaj Najle fiksu mian karnon, ĉar amaso da malbonuloj staras ĉirkaŭ mi²⁸.

14 Kaj ree: *Jen, mian dorson mi elmetis al la batado, kaj la vangojn al la frapoj; mian vizaĝon mi faris kiel siliko*²⁹.

Antaŭdiroj pri la Pasiono de la Sinjoro

6:1 Kiam do li plenumis la ordonojn, kion li diras? *Kiu procesos kontraŭ mi? Li stariĝu kontraŭ mi. Kiu postulas juĝon kontraŭ mi? Li alproksimiĝu al la sklavo de la Sinjoro. 2 Ve al vi, ĉar vi ĉiuj elfrotiĝas kiel vesto, kaj tineo vin*

²⁵ Mateo 9:13.

²⁶ Zeharja 13:6-7.

²⁷ Psalmo 22:20.

²⁸ Psalmo 119:120 laŭ LXX, 22:16.

²⁹ Jesaja 50:6-7.

*tramanĝas*³⁰, kaj aliloke diras la profeto, kiam Jesuo estis metita kiel peza ŝtono por frakasado: *Jen, Mi metas en la fundamenton de Cion ŝtonon valoran, elektitan, bazangulan, honoratan*³¹. 3 Kaj poste, kion Li diras? *Kiu fidas je li, tiu vivos por eterne*³². Ĉu ni do metu nian fidon sur ŝtonon? Absolute ne! Sed tio signifas, ke la Sinjoro metis sian karnon en forton. Ĉar li diras: *Li metis min kiel ŝtonon el siliko*³³.

4 Kaj la profeto krome diras: *Ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj, fariĝis ŝtono bazangula*³⁴. Kaj alifoje li diras: *Tiu ĉi tago estas granda kaj mirinda; ĝin faris la Sinjoro*³⁵.

5 Mi skribas des pli simple al vi, por ke vi komprenu, – mi, balaaĵo de via amo. 6 Kion do plu diras la profeto? *Amaso da malbonuloj staras ĉirkaŭ mi, ili ĉirkaŭas min kiel abeloj mielĉelaron*³⁶ kaj: *Pri mia tuniko ili lotas*³⁷.

7 Ĉar li aperos kiel suferanto en la karno, antaŭe lia pasiono estis montrita. Ĉar la profeto diras kontraŭ Izrael: *Ve al ilia animo, ĉar ili mem repagis al si malbonon*³⁸, dirante: Ni ligu la justulon, ĉar li malplaĉas al ni.

8 Kion diras tiu alia profeto, Moseo, al ili? *Jen, tion diras la Sinjoro Dio: Eniru en la landon, la bonan, pri kiu ĵuris la Sinjoro al Abraham kaj Isaak kaj Jakob, kaj ekposedu ĝin, tiun landon, en kiu fluas lakto kaj mielo*³⁹.

9 Kion diras la scio, lernu: Fidu je li – ŝi diras – li, kiu aperos al ni en la karno, Jesuo. Ĉar homo estas tero suferanta; ĉar el la vizaĝo de la tero estis formita Adam. 10 Kion do signifas: *En la landon, la bonan, en kiu fluas*

³⁰ Jesaja 50:8-9.

³¹ Jesaja 28:16; Romanoj 9:33; 1 Petro 2:6.

³² Jesaja 28:16; Genezo 3:22.

³³ Jesaja 50:7.

³⁴ Psalmo 118:22.

³⁵ Psalmo 118:24.

³⁶ Psalmo 22:16; 118:12.

³⁷ Psalmo 22:19.

³⁸ Jesaja 3:9.

³⁹ Eliro 33:1.3; Readmono 1:25; Levidoj 20:24.

lakto kaj mielo? Laŭdata <estu> nia Sinjoro, fratoj, kiu saĝecon kaj komprenon metis en nin, pri Siaj sekretoj. Ĉar la profeto diras parabolon de la Sinjoro: kiu ĝin komprenos, krom saĝulo, kiu komprenas kaj amas sian Sinjoron? 11 Ĉar Li do renovigis nin per pardono de niaj pekoj, Li faris nin nova formo, por havi la animon de infanoj, ĉar Li ja rekreis nin tutnove

12 Ĉar la Skribo parolas pri ni, kiam Li parolas al la Filo: *Ni kreu la homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la bestoj de la tero kaj la birdoj de la ĉielo kaj la fiŝoj de la maro*⁴⁰, kaj diris la Sinjoro, vidante nian belan staturon: *Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron*⁴¹. Tion <Li diris> al la Filo.

13 Mi ankaŭ montros al vi, kiel Li tion diris al ni. Duan kreon Li faris en ĉi lasta tempo. Diras la Sinjoro: *Jen, Mi faros la lastajn kiel la unuajn*⁴². Reage al tio heroldis la profeto: *Eniru en landon, en kiu fluas lakto kaj mielo, kaj regu pri ĝi*⁴³.

14 Sciu do, ke ni estas noveformitaj, kiel Li ree diras tion ĉe alia profeto: *Jen – diras la Sinjoro – Mi forprenos el ili, t. e. el tiuj, kiujn antaŭvidis la spirito de la Sinjoro, la ŝtonan koron kaj enmetos koron karnan*⁴⁴; ĉar mem Li estis aperonta en karno kaj ekloĝos inter ni.

15 Kaj, miaj fratoj, sankta templo por la Sinjoro estas tiu loĝejo de nia koro⁴⁵. 16 Diras ja ree la Sinjoro: *Kiel mi aperos antaŭ la Sinjoro mia Dio kaj estos honorata*⁴⁶? Li diras: *En la mezo de popola kunveno mi vin gloros; kaj mi*

⁴⁰ Genezo 1:26.

⁴¹ Genezo 1:28.

⁴² Aspektas ke devas esti cito, sed de kie ne klaras.

⁴³ Eliro 33:3.

⁴⁴ Jehezkel 11:19; 36:26.

⁴⁵ Efezanoj 2:21-22.

⁴⁶ Psalmo 42:3; Jesaja 49:5.

*prikantos vin inter la gentoj*⁴⁷. Ĉu do ne estas ni tiuj, kiujn Li enkondukis en la landon, la bonan?

17 Kaj tiu lakto, kaj tiu mielo – kio do estu? La infano vivtenas sin komence per mielo, poste per lakto. Tiel do ankaŭ ni vivos por regi la teron, vivigitaj de la fido de la promeso kaj de la parolo. 18 Sed Li krome diris: *Kaj ili fruktu kaj multiĝu kaj regu super la fiŝoj*. Kiu do kapablas regi super bestoj aŭ fiŝoj aŭ birdoj de la ĉielo? Ĉar ni devas kompreni, ke regi implicas potencon, ĉar kiu ordonas, estas la sinjoro. 19 Se do nun tio ne okazas, sed tamen ja estas promesite, *kiam* do? Tiam, kiam ankaŭ ni mem fariĝis perfektaj, por fariĝi heredantoj de la Interligo de la Sinjoro.

Fasto kaj propeka kapro estis simboloj pri la pasiono de la Sinjoro

7:1 Komprenu do, idoj de la ĝojo, ke ĉion la bona Sinjoro antaŭbildigis al ni, por ke ni sciu, kiun ni laŭdu kaj danku pri ĉio. 2 Se do la Filo de Dio, kiu estas la Sinjoro, *kiu juĝos la vivantojn kaj la mortintojn*⁴⁸, mortis, por ke lia vundfrapo vivigu nin, tiam ni fidu, ke la Filo de Dio ne povis suferi krom pro ni. 3 Kiam li estis krucumita, ili donis al li trinki vinon miksitan kun galo⁴⁹. Aŭskultu, kiel la pastroj de la templo tion antaŭe montris. Ĉar diras la ordono: *Kiu ne tenas la faston, per morto estu neniigita*⁵⁰; la Sinjoro ordonis <tion>, ĉar pro niaj pekoj li estis mem dononta la oferon [de la vazo] de sia spirito, kaj egala al ĝi estu ankaŭ la antaŭfiguro de Isaak, oferita sur la altaro⁵¹. 4 Kion do diras li ĉe la profeto? *Ili manĝis el la kapro, oferita kun fasto, pro ĉiuj iliaj pekoj*⁵².

Atente legu zorgeme: *Kaj manĝis nur ĉiuj pastroj la intestojn, sen lavi, kun vinagro*⁵³. 5 Kial? Ĉar al mi⁵⁴, kiu estas oferonta mian karnon pro la pekoj

⁴⁷ Psalmo 22:23; 108:4.

⁴⁸ 2 Timoteo 4:1.

⁴⁹ Mateo 27:34.

⁵⁰ Levidoj 23:29.

⁵¹ Traduko ne tute certa.

⁵² Cito neklara; komparu Eliro 29:32-33; Nombroj 29:11.

⁵³ Cito neklara.

de mia nova popolo, vi donos trinki galon kun vinagro: manĝu nur vi solaj, dum fastas kaj lamentas la popolo en sakoj kaj cindro – por ke montriĝu, ke necesis, ke li suferu pro ili.

6 Atentu do, kio estis ordonita: *Prenu du bokojn belajn kaj similajn, kaj oferu ilin, kaj prenu la pastro unu por holokaŭsto pro la pekoj*⁵⁵. 7 Kaj pri la alia kion ili faros? *Malbenita* – li diras – *estas tiu unu*⁵⁶. Atentu, kiel antaŭfiguriĝas Jesuo: 8 *Kaj vi ĉiuj surkraĉu kaj trapiku kaj ĉirkaŭligu ĝian kapon per skarлата lano, kaj tiel ĝi estu forsendita en la dezerton*⁵⁷. Kaj kiam ĉio ĉi tiel estis farita, tiu kiu forprenis la kapron, portis ĝin en la dezerton, kaj deprenis la lanon, metis ĝin sur sekan trunkarbuston, kiun oni nomas *raĥi*, de kie fruktojn ni kutimas manĝi, kiam tiujn ni trovas tiuregione. Nur la fruktoj de tiu speco de trunkarbusto estas dolĉaj.

9 Kial do estas tiel? Atentu: Unu vi vidas sur la altaro, la alia estas malbenita, kaj kial la malbenita estas kronita? Ĉar tiam, en tiu tago, ili vidos lin kun la mantelo ĝispieda, la skarлата, ĉirkaŭ sia karno kaj ili demandos: Ĉu ne li estis, kiun ni krucumis, post kiam ni malestimis kaj trapikis kaj surkraĉis lin? Ja vere, estis li, kiu tiam diris, ke li estas la Filo de Dio. 10 Ĉar, kial simila li estas al li? Ja tiucele la boko estis similaj, belaj, egalaj, por ke, kiam ili tiam vidos ĝin alveni, ili estu mirigitaj pro la simileco de la boko. Jen do, la antaŭfiguriĝo de Jesuo, kiu estis suferonta.

11 Kaj kial, do, ili metis la lanon mezen de la dornaĵoj? Antaŭfiguro⁵⁸ estas de Jesuo, metita antaŭ la Eklezio. Ĉar kiu volas forpreni la lanon skarlatan, tiu neeviteble devos multe suferi, ĉar la dornaĵo estas timinda, kaj nur tiel li akiros ĝin per multa suferado. Tiel – diras la Sinjoro – ĉiuj,

⁵⁴ Lingve stranga transiro al «mi».

⁵⁵ Levidoj 16:7.9. La vorto 'holokaŭsto' indikas oferon, el kiu la piuloj ne manĝu; oni bruligu ĝin tutan por Dio.

⁵⁶ Levidoj 16:8.10.

⁵⁷ Cito neklara; komparu Levidoj 16:21-22.

⁵⁸ Tipo aŭ tipologio.

kiuj volas vidi min kaj ekposedi mian regnon⁵⁹, devos elteni kaj suferi multon por atingi min.

La ruĝa bovido simbolo de Kristo

8:1 Kion tipologie simbolas tio, ke al Izrael estis ordonite⁶⁰ ke oferu bovidon la viroj, sur kiuj pezis granda peko, kaj buĉinte ili bruligu ĝin, kaj ke tiam sklavoj⁶¹ ekprenu la cindron kaj metu ĝin en vazojn kaj metu la lanon skarlatan kune kun hisopo sur lignon (jen denove la tipologio de la kruco kaj la lano purpura), kaj ke tiel la sklavoj aspergu la popolon, ĉiun unuope, por ke ili estu purigitaj de siaj pekoj? 2 Atentu, kiel en simpleco li parolas al vi. La bovido estas Jesuo, la oferantaj viroj estas la pekuloj, kiuj kondukas lin al la morto. Sed nun ne plu estas la viroj, ne plu la gloro de pekuloj. 3 La sklavoj, kiuj aspergas, estas tiuj, kiuj bonmesaĝis al ni la pardonon de la pekoj kaj la purigon de la koro, al kiuj li donis la potencon de la evangelio⁶², ĉar ili estas dek du por atesti pri la ligno (ja estas dek du la triboj de Izrael), por mesaĝi. 4 Sed kial estas tri sklavoj, kiuj aspergas? Por atesti, ke Abraham, Izaak kaj Jakob estas grandaj antaŭ Dio. 5 Kaj kial la lano estis sur la ligno? Ĉar la reĝeco⁶³ de Jesuo <estas> sur la kruco, kaj tiuj, kiuj esperas je li vivos poreterne. 6 Kial do kune kun la lano ankaŭ estis hisopo? Ĉar en lia regno la tagoj estos suferplenaj kaj malpuraj, en kiuj ni saviĝos; kaj kiu suferas en la korpo, saniĝas de la malpuro per la hisopo. 7 Kaj tial do tiu historio estas klara por ni, sed por ili obskura, ĉar ili ne aŭskultis la voĉon de la Sinjoro.

⁵⁹ Agoj 14:22.

⁶⁰ Nombroj 19:1-10.

⁶¹ Aŭ: knaboj.

⁶² Bonmesaĝi kaj evangelio, origine unu sama vorto.

⁶³ Aŭ: regno.

La spirita senco de la cirkumcido

9:1 Krome li ankaŭ parolas pri niaj oreloj, kiel nian koron li cirkumcidis. La Sinjoro diras ĉe la profeto: *Per atentaj oreloj ili obeis min*⁶⁴, kaj li ankaŭ diras: *Aŭdade ili aŭskultos, la malproksimuloj, kion Mi faris, tion ili ekkonos*⁶⁵. Kaj: *Cirkumcidu, diras la Sinjoro, viajn korojn*⁶⁶. 2 Kaj li ankaŭ diras: *Aŭskultu, Izrael, ĉar ĉi tion diras la Sinjoro via Dio*⁶⁷, kaj ree profetas la Spirito de la Sinjoro: *Kiu estas tiu, kiu deziras vivi*⁶⁸ ĝiseterne? *Aŭdade aŭskultu la voĉon de mia sklavo*⁶⁹. 3 Alifoje li diras: *Aŭskultu, ho ĉielo, kaj atentu, ho tero, ĉar parolas la Sinjoro*⁷⁰ tion por atesti. Kaj ree li diras: *Aŭskultu la parolon de la Sinjoro, ho regantoj de Lia popolo*⁷¹, kaj ree li diras: *Aŭskultu, infanoj, la voĉon de kianto en la dezerto*⁷². Ĉu li ne cirkumcidis niajn orelojn, por ke aŭdante lian parolon ni fidu je li?

4 La cirkumcido, je kiu ili fidis, estas nuligita, ĉar li diris, ke li parolis pri cirkumcido, kiu ne fariĝas en la karno; sed ili malobeis, ĉar malica anĝelo trompis ilin. 5 Li ja diris al ili: *Tion diras la Sinjoro via Dio* (tiel mi trovas <novan> ordonon): *Ne semu inter dornaĵo, cirkumcidu vin al via Sinjoro*⁷³. Kaj kion li diras? *Cirkumcidu la prepucion de via koro, kaj ne estu plu malmolnukaj*⁷⁴. Prenu ankaŭ tion: *Jen, diras la Sinjoro, ĉiuj popoloj estas ne cirkumciditaj je la prepucio, sed ĉi tiu popolo estas ne cirkumcidita je la koro*⁷⁵.

⁶⁴ Psalmo 18:45.

⁶⁵ Jesaja 33:13.

⁶⁶ Jeremia 4:4.

⁶⁷ Jeremia 7:2.

⁶⁸ Psalmo 34:13.

⁶⁹ Cito ne klara.

⁷⁰ Jesaja 1:2.

⁷¹ Jesaja 1:10 – sed la originalo diras: regantoj de Sodom!

⁷² Jesaja 40:3.

⁷³ Jeremia 4:3-4.

⁷⁴ Readmono 10:16.

⁷⁵ Jeremia 9:25-26.

6 Sed vi diros: La popolo estas cirkumcidita por <montri pri> sigelo. Sed same estas ĉiu Siriano kaj ĉiu Arabo kaj ĉiuj pastroj de la idoloj. Ĉu do ankaŭ tiuj ĉiuj estas inter <la limoj de> lia Interligo? Ja ankaŭ la Egiptoj estas en cirkumcido.

7 Lernu do, infanoj de la amo, pri ili ĉiuj abunde: Abraham, la unua kiu praktikis la cirkumcidon, en la Spirito rigardis antaŭen al Jesuo, cirkumcidis <sian domon>, prenante la simbolon de la tri literoj. 8 <La Skribo> ja diras: *Kaj cirkumcidis Abraham el sia domo virojn dek, ok kaj tricent*⁷⁶. Kiu scio do estis donita al li? Lernu, ke unue dek kaj ok, kaj post iom da paŭzo li diras tricent. Dek ok: jota estas dek, eta – ok⁷⁷; jen vi havas Jesuon. Sed por ke la kruco havu la gracon en la litero T, li ankaŭ diras la tricent. Do li indikas Jesuon per la du literoj, kaj per unu la krucon. 9 Tion ĉi scias Tiu, kiu metis la ennaskitan donacon de sia instruo en nin. Neniu lernis de mi pli mirindan aferon; sed mi scias, ke vi estas indaj.

Spirita senco de la ordonoj de Moseo pri la bestoj

10:1 Nu, ke Moseo diris⁷⁸: *Vi ne manĝu porkon nek aglon nek akcipitron nek korakon nek ajnan fiŝon, kiu ne havas skvamojn sur si, <tion dirante> li prenis tri bildojn en sia menso. 2 Krome <la Sinjoro> diras al ili en Readmono: Al tiu ĉi popolo Mi instruos Miajn leĝojn kaj ordonojn*⁷⁹. Kompreneble ne estas la ordono de Dio la ne-manĝado, sed Moseo parolis en Spirito. 3 La porkon pro ĉi tio li menciis: vi ne ligiĝu – li celas – al tiaj homoj, kiuj estas similaj al porkoj; t. e. kiam ili delicumas en ĝuado, ili forgesas pri la Sinjoro, sed kiam ili trafas en problemojn, ili rememoras pri la Sinjoro, same kiel la porko, kiam ĝi manĝas, ne konas sian sinjoron, sed kiam ĝi malsatas, ĝi eklekas, kaj ricevinte manĝi ĝi ree silentas.

⁷⁶ Genezo 14:14; 17:23.27.

⁷⁷ En la klasika Greka, ĉiuj literoj ankaŭ estis uzataj por indiki ciferojn, unue 1-10 (α β γ δ ε ς ζ η θ ι), poste 20, 30, 40 ktp (κ λ μ ν ξ ο π ρ), poste 100, 200, 300 (ρ σ τ) ktp. Jota kaj eta, respektive I, ι kaj H, η = 10 kaj 8. Kune ili estis uzataj por indiki Jesuon (ΙΗΣΟΥΣ, Ιησούς); la taŭ, T, τ = 300. Pro ĝia formo, ĝi simbolas la krucon.

⁷⁸ Komparu kun Levidoj 11, Readmono 14.

⁷⁹ Readmono 4:5.

4 *Vi ankaŭ ne manĝu la aglon nek la akcipitron nek la milvon nek la korakon*⁸⁰; vi ne ligiĝu – li celas – nek similiĝu al tiaj homoj, kiuj ne scias havigi al si sian nutraĵon per penado kaj ŝvitado, sed kiuj rabas la aliulaĵojn en sia senleĝeco kaj, kvankam promenante kun senkulpa mieno, ili gvatas, kiun ili povas forvori en sia glutemo, same kiel ankaŭ tiuj birdoj kiel solaj ne havigas manĝi al si mem sed, sidante senfaraj, serĉas, kiel aliulan karnon ili forvoru, montrante sin pesto <al la ceteraj> per sia malboneco.

5 *Kaj vi ne manĝu, li diras, petromizon nek polipon nek sepion*⁸¹; vi ne similiĝu – li celas – nek aliĝu al tiaj homoj, kiuj ĝisfine estas malpiaj kaj komplete kondamnitaj al la morto, same kiel tiuj fiŝospecoj nur malbenitaj drivas en la profundo, sed ne naĝas supre kiel la ceteraj <fiŝoj>, sed loĝas profunde sube sur la grundo.

6 *Kaj La leporon vi ne manĝu*⁸². Kial do? Vi ja ne fariĝu knabkoruptanto nek similiĝu je tiaj homoj, ĉar la leporo ĉiujare plimultigas sian pugotruon; ĉar kiom da jaroj ĝi vivas, tiom da ĝi havas.

7 Sed *ankaŭ la hienon vi ne manĝu*⁸³; vi ne fariĝu – li celas – adultanto nek koruptanto nek similiĝu je tiaj homoj. Kial do? Ĉar tiu besto ĉiujare ŝanĝas sian sekson kaj estas jen vira, alifoje ree ina.

8 Sed *ankaŭ la mustelon*⁸⁴ li prave malamis. Vi ne fariĝu – li celas – tia homo, pri kiuj ni aŭdis, ke ili faras malpie malpuraĵon per la buŝo, nek ligiĝu al la malpuraj virinoj, kiuj faras malpiaĵon per la buŝo⁸⁵. Ĉar tiu besto gravediĝas per la buŝo.

9 Pri la manĝaĵoj, prenante tri simbolojn⁸⁶, Moseo tiel parolis en la Spirito: sed pro sia laŭkorpa deziro ili komprenis tion kvazaŭ <nur> pri

⁸⁰ Levidoj 11:13-16.

⁸¹ Levidoj 11:10.

⁸² Levidoj 11:6.

⁸³ Devas esti citaĵo, sed nekonata.

⁸⁴ Levidoj 11:29 – eble alia traduko?

⁸⁵ Aludas pri seksa agado.

⁸⁶ Laŭlitere: tri dogmojn, instruojn.

manĝaĵo. 10 De ĉi samaj tri simboloj David kaptis la sencon kaj jene diris: *Feliĉa estas la homo, kiu ne iras laŭ konsilo de malpiuloj, same kiel la fiŝoj iras en la mallumo ĝis la profundo; nek staras sur vojo de pekuloj*⁸⁷, same kiel tiuj, kiuj ŝajne timas antaŭ la Sinjoro, sed <efektive> pekas kiel la porko, *kaj ne sidas en kunsido de blasfemuloj*⁸⁸, same kiel la birdoj, kiuj sidas pretaj por rabi. Jen vi havas perfekte, kio koncernas la manĝaĵojn.

11 Sed Moseo ankoraŭ diras: *Vi manĝu ĉiun bruton, kiu havas disfenditajn hufojn kaj kiu remaçadas*⁸⁹. Kion li celas diri? Ke kiu akceptas la nutraĵon, konas sian nutrinton, kaj ripozante ĉe li videble ĝojas. Brile li diris tion, atente al la instruo. Kion do li diras? Ligiĝu al tiuj, kiuj timas antaŭ la Sinjoro, al tiuj, kiuj primeditadas la instruon de la parolo en sia koro, al tiuj, kiuj eldiras la juĝojn de la Sinjoro kaj ilin plenumas, al tiuj, kiuj scias, ke la meditado estas ago de ĝojo, kaj remaçado de la parolo de la Sinjoro.

Sed tiu disfendita hufo? Ke la justulo ja promenas en ĉi tiu mondo, sed elrigardas al la venonta epoko. Rigardu, kiel bele Moseo tion metis en sian Leĝon. 12 Sed kiel estis eble por ili kapti aŭ kompreni tion? Ni, kiel estas juste, komprenas liajn instruojn, kaj ni klarigas ilin, kiel tion deziris la Sinjoro. Kun tiu intenco li ja cirkumcidis niajn orelojn kaj niajn korojn, por ke tion ni komprenu.

La bapto kaj la kruco antaŭbilditaj en la Skribo

11:1 Ni serĉu do, ĉu la Sinjoro zorgis pri tio, antaŭbildigi pri la akvo <de la bapto> kaj pri la kruco. Pri la akvo ja estas skribite, koncerne Izraelon, ke la bapton je pardono de la pekoj ili ne ricevu, sed al si mem ili konstruu alian. 2 Diras ja la profeto: *Miregu pri tio, ho ĉielo, kaj pri tio pleje sentu teruron la tero, ke du malbonagojn faris tiu ĉi popolo: Min ili forlasis, la fonton de la vivo, kaj por si mem ili elhakis puton de la morto*⁹⁰. 3 Ĉu roko

⁸⁷ Psalmo 1:1.

⁸⁸ Psalmo 1:2.

⁸⁹ Levidoj 11:3; Readmono 14:6.

⁹⁰ Jeremia 2:12-13 iom adaptita.

dezerta estas Mia sankta monto Cion⁹¹? Ĉar vi estos kiel idoj de birdoj, kiuj forflugas kiam la nesto estas rabita⁹².

4 Laj ree diras la profeto: *Mi iros antaŭ vi kaj ebenigos montojn; kuprajn pordojn Mi disbatos, kaj ferajn riglilojn Mi rompos, kaj Mi transdonos al vi trezorojn sekretajn, kaŝitajn kaj neviditajn, por ke ili sciu, ke Mi estas la Sinjoro Dio⁹³.* 5 Kaj Vi loĝos en alta groto de forta roko, kaj ĝia akvo estas fidinda. La reĝon vi vidos en lia gloro, kaj via animo meditos en timo antaŭ la Sinjoro⁹⁴.

6 Kaj ree li diras ĉe alia profeto: *Kiu tion faras, tiu estos kiel arbo, plantita apud kruciĝoj de akvoj, kiu donos sian frukton en sia momento, kaj ties folio ne velkos, kaj ĉio, kion li faros, tio prosperos al li.* 7 Ne tiel same la malpiuloj, ne same, sed kiel grenŝelaro, kiun forblovas la vento for de la surfaco de la tero. Tial ne straros la malpiuloj en la juĝo nek la pekuloj en la kunsido de la justuloj, ĉar konas la Sinjoro la vojon de la justuloj, kaj la vojo de la malpiuloj pereos⁹⁵.

8 Atentu, kiel la akvon kaj la krucon li difinis samtempe: ĉar tio ja volas diri: feliĉaj, kiuj metante sian esperon je la krucon, descendis al la akvo, ĉar – li diras: – ili ricevos sian rekompencan en sia tempo; tiam – li diras – mi repagos. Sed nun li diras: Iliaj folioj ne velkos, t. e.: ĉiu vorto, kiu eliros el ilia buŝo en fido kaj amo, tio donos konvertiĝon kaj esperon al multaj.

9 Kaj ree alia profeto diras: *Kaj la lando de Jakob estos pli alta ol ĉiu alia lando⁹⁶.* T. e. la <Sinjoro> gloros la vazon de sia Spirito. 10 Kion poste li diras? *Kaj estis rivero, kiu fluis dekstre, kaj leviĝis el ĝi belaj arboj; kaj kiu manĝas el ili, tiu vivos eterne⁹⁷.* 11 Tio signifas, ke ni descendas al la alvo, plenaj ja pekoj kaj malpuro, sed ree leviĝas kun kiel frukto en la koro la timon <antaŭ Dio> kaj la fidon je Jesuo en nia spirito. Kaj kiu manĝas el

⁹¹ Komparu kun Jesaja 16:1-2.

⁹² Laŭ la kunteksto devas esti cito, komparu eble kun Jesaja 16:2-3.

⁹³ Jesaja 45:2-3; Psalmo 107:16.

⁹⁴ Laŭ Jesaja 33:16-17.

⁹⁵ Psalmo 1:3.6.

⁹⁶ Eble komparu kun Cefanja 3:19-20.

⁹⁷ Laŭ Jeĥezkel 47:1.12.

tio, tiu vivos poreterne – t. e.: kiu aŭskultas – li diras – tiujn dirojn, kaj fidas, tiu vivos poreterne.

Bildigoj pri la kruco en la Skribo

12:1 Sammaniere pri la kruco li difinas ĉe alia profeto, kiu diras: *Sed kiel, kaj kiam do*⁹⁸ *realiĝos?* Diras la Sinjoro: *Kiam la ligno kliniĝos kaj leviĝos, kaj kiam la sango degutados de la ligno*⁹⁹. Jen ree temas pri la kruco kaj pri tiu, kiu estis krucumota.

2 Sed denove li parolis al Moseo, kiam Izrael estis atakita de fremduloj, kaj por ke li memorigu ilin, ĉe tiu atakado, ke pro iliaj pekoj ili estis transdonitaj al la morto; en la koron de Moseo inspiris la Spirito, ke li faru figuron de kruco kaj de tiu, kiu estis suferonta, ĉar ke se ili ne metu sian esperon je li – li diris – poreterne ili estos venkataj. Moseo do metis unu armilon super alian <armilon> meze de la kampadejo kaj starigante sin pli alte ol ĉiuj ceteraj, li elstreĉis la manojn, kaj tiel ree venkis Izrael. Sed poste, kiam li delasis, ree ili estis neniigitaj. 3 Kial? Por ke ili eksciis, ke ili ne povas saviĝi, krom se ili esperas je li. 4 Kaj ĉe alia profeto li ree diras: *Ĉiutage Mi etendis Miajn manojn al popolo nefidanta, al tiuj, kiuj kontraŭas Mian justan vojon*¹⁰⁰.

5 Ree Moseo faris bildon pri Jesuo, ke li devas suferi, kaj ke <aliajn> li vivigos, dum ili kredis lin pereinta sur tiu signo¹⁰¹, dum Izrael falis. La Sinjoro ja faris, ke ĉiu serpento mordu ilin, kaj ili mortis¹⁰² (ĉar la malobeco en Eva okazis per serpento), por ke Li konvinku ilin, ke la sufero de la morto estis transdonita al ili pro tiu ilia malobeco. 6 Plue jen Moseo, kiam li ordonis: *Ne estu skulptita aŭ fandita bildo ĉe vi por Dio*¹⁰³, li mem faris, ke bildon pri Jesuo li montris. Moseo do faris bronзан serpenton kaj starigis ĝin plenglore, kaj per heroldaĵo alvokis la popolon.

⁹⁸ 4 Ezra 4:33.

⁹⁹ 4 Ezra 5:5.

¹⁰⁰ Jesaja 65:2.

¹⁰¹ = la kruco.

¹⁰² Nombroj 21:6 k. s.

¹⁰³ Readmono 27:15.

7 Kiam ili do kunvenis, ili petis Moseon, ke anstataŭ ili li faru oferon por ilia kuraciĝo. Sed Moseo diris al ili: *Kiam iu el vi – li diris – estas mordita, li venu al la serpento metita sur la ligno, kaj li esperu kaj fidu, ke eĉ se mortinta li povos esti vivigita, kaj li tuj saviĝos*¹⁰⁴, kaj tiel ili faris. Jen ree ekzemplo kaj en ĝi vi vidas la gloron de Jesuo; *ĉar per li kaj por li ĉio estas*¹⁰⁵.

Josuo, David kaj Jesaja atestantoj pri Jesuo

8 Kion ree diras Moseo al Josuo¹⁰⁶, filo de Nun, kiam tiun nomon li donis al li, por esti profeto, nur por ke la tuta popolo aŭdu ke la Patro malkaŝu ĉion pri sia filo Jesuo? 9 Diras do Moseo al Josuo, filo de Nun, doninte tiun nomon, kiam li sendis lin kiel spionon de la lando: *Prenu libron en viaj manoj kaj skribu, kion deklaras la Sinjoro, ke la filo de Dio elradikigos en la lastaj tagoj ĉiun domon de Amalek*¹⁰⁷. 10 Rigardu ree: Jesuo, ne filo de homo, sed filo de Dio, *malkaŝiĝis en la karno*¹⁰⁸. Ĉar ili do estis dirontaj, ke la Kristo estas filo de David, David mem, timante kaj komprenante la stultan eraron de la pekuloj, profete diris: *La Sinjoro diris al mia sinjoro: Sidu dekstre de Mi ĝis Mi faros viajn malamikojn benketo por viaj piedoj*¹⁰⁹. 11 Kaj ree diras Jesaja tiel: *Tiele diras la Sinjoro al mia Sinjoro Kristo, kies dekstran manon mi prenis, por ke obeu antaŭ li la popoloj, kaj la forton de reĝoj mi disbato*¹¹⁰. Jen, kiel David lin nomas Sinjoro, kaj filo lin li ne nomas.

La kristana popolo, ne la unua por heredi

13:1 Sed ni rigardu, ĉu tiu ĉi popolo estas la heredanto aŭ la unua, kaj ĉu la Interligo apertenas al ni aŭ al ili. 2 Aŭdu do pri tiu popolo, kion diras la Skribo: *Kaj Isaak preĝis al la Sinjoro pri sia edzino Rebeka, ĉar ŝi estis*

¹⁰⁴ Nombroj 21: 8-9.

¹⁰⁵ Kolosanoj 1:16.

¹⁰⁶ En la Greka la nomoj Josuo kaj Jesuo estas identaj.

¹⁰⁷ Eliro 17:14.16.

¹⁰⁸ 1 Timoteo 3:16.

¹⁰⁹ Psalmo 110:1.

¹¹⁰ Jesaja 45:1. Kristo estas Hebree Maŝiaĥ = Mesio; en traduko: Sanktoleito.

senfrukta; kaj ŝi gravediĝis¹¹¹ kaj ekiris Rebeka por demandi la Sinjoron; kaj la Sinjoro diris al ŝi: *Du popoloj estas en via ventro, kaj unu popolo estos pli forta ol la dua, kaj la pli aĝa servos la malpli aĝan*¹¹². 3 Vi devas do kompreni, kiu estas Isaak kaj kiu Rebeka, kaj pri kiuj personoj la Skribo deklaras, ke tiu ĉi popolo estu preferinda ol tiu.

4 Kaj ĉe alia profetaĵo Jakob tre klare parolas al sia filo Jozef, dirante: *Jen, la Sinjoro ne senigis min de via vizaĝo; alvenigu al mi viajn filojn, por ke tiujn mi benu*¹¹³. Kaj li alvenigis Efraimon kaj Manasen, dezirante ke Manasen li benu, ĉar li estis la pli aĝa; ĉar Jozef alkondukis lin al la dekstra mano de sia patro Jakob. Sed Jakob vidis en la Spirito la antaŭbildon de la estonta popolo. Kaj kion diras <la Skribo>? *Kaj Jakob metis siajn manojn inverse kaj la dekstran manon li metis sur la kapon de Efraim, la dua la pli juna, kaj benis tiun. Kaj Jozef diris al Jakob: Transigu vian dekstran manon sur la kapon de Manase, ĉar tiu estas mia unuenaskita filo. Kaj Jakob diris al Jozef: Mi scias, filo, mi scias; sed la pli aĝa servos la pli junan, kaj tiu estos benata*¹¹⁴.

6 Rigardu, sur kiujn li metis <la manojn>, tiu popolo estu la unua kaj la heredanto de la Interligo¹¹⁵.

7 Se do ankaŭ estu memorite pri Abraham, ni atingos la perfektigon de nia scio. Kion do diras la Sinjoro al Abraham, kiu nur pro sia fido estis konsiderata kiel justulo? *Jen, Mi faris vin patro de la popoloj, kiuj fidas je Dio, sen cirkumcido*¹¹⁶.

La Nova Interligo per la saviĝo pere de Jesuo

14:1 Jes <tiel estas>. Sed ni rigardu, ĉu la Interligo, pri kiu Li ĵuris al la patroj, ke Li donos ĝin al la popolo, ni serĉu, ĉu tiun Li donis. Li donis; sed per siaj pekaj ili montriĝis ne indaj akcepti ĝin. 2 Ĉar la profeto diras:

¹¹¹ Genezo 25:21.

¹¹² Genezo 25:22-23; komparu kun Romanoj 9:10-12.

¹¹³ Genezo 48:10-11.

¹¹⁴ Genezo 48:18-19.

¹¹⁵ La interŝanĝo de la pli aĝa kaj la pli juna filoj, ĉi tie do rolas kiel simbolon por interŝanĝo inter la pli aĝa popolo kaj la kristana eklezio kiel pli juna popolo.

¹¹⁶ Genezo 17:4-5; Romanoj 4:10-11. La cito estas klare adaptita.

Kaj Moseo fastis sur la monto Sinaj, por akcepti la Interligon kun la Sinjoro por la popolo, kvardek tagojn kaj kvardek noktojn. Kaj Moseo ricevis de la Sinjoro la du tabelojn, skribitajn en la Spirito per la fingro de la Sinjoro¹¹⁷. Kaj kiam Moseo ilin ricevis, li portis ilin suben por prezenti al la popolo. 3 Kaj la Sinjoro diris al Moseo: Moseo, Moseo, rapide iru malsupren, ĉar via popolo, kiun vi elkondukis el la lando Egipta, malvirtigis. Kaj Moseo komprenis, ke ili ree faris al si fanditajn idolojn, kaj li forĵetis el siaj manoj la tabelojn, kaj frakasiĝis la tabeloj de la Interligo de la Sinjoro¹¹⁸.

4 Moseo do ricevis ilin, sed ili ne montriĝis indaj. Eksciu do, kiel ni ricevis ĝin. Moseo, kiel servanto¹¹⁹, ricevis ĝin; sed la Sinjoro mem, suferinta por ni, donis ĝin al ni kiel popolo de lia heredo. 5 Sed li manifestiĝis, por ke ili perfektigu en siaj pekoj, kaj ni, fariĝante heredantoj, ricevu de nia Sinjoro Jesuo la Interligon, kiu por tio pretiĝis, ke li mem aperu por liberigi niajn korojn, kiuj estis ja neniigitaj de la morto kaj transdonitaj al la malica erarado, el la malumo, kaj ke sian Interligon li starigu kun ni per sia parolo.

6 Estas je skribite, kiel al li la Patro ordonis, formi por si sanktan popolon, por savi nin el la obskuro. 7 Ĉar diras la profeto: *Mi, la Sinjoro via Dio, vokis vin en justeco kaj Mi kaptos vian manon kaj Mi fortigos vin, kaj Mi donis vin kiel Interligon por la popolo, lumon de la nacioj, por malfermi la okulojn de la blindaj kaj elkonduki el la katenoj la katenitojn kaj el la malliberejo tiujn, kiuj sidas en mallumo¹²⁰.* Vi do ekscias, de kie ni estis liberigitaj.

8 Kaj ree diris la profeto: *Jen, Mi faris vin lumo por la nacioj, por ke vi estu saviĝo ĝis la fino de la tero. Tiel diras la Sinjoro, via Liberiganto, Dio¹²¹.*

9 Kaj ree diras la profeto: *La Spirito de la Sinjoro estas sur mi, ĉar Li sanktoleis min, por bonmesaĝi gracon al la humiluloj, Li sendis min sanigi la kore premitojn, por anonci la liberigon al la malliberigitaj kaj al blinduloj, ke ili*

¹¹⁷ Eliro 24: 18; 31:18.

¹¹⁸ Eliro 32:7-19; Readmono 9:12-17.

¹¹⁹ Hebreoj 3:5.

¹²⁰ Jesaja 41:6-7.

¹²¹ Jesaja 49:6-7.

ree vidos, por anonci jaron plaĉan al la Sinjoro kaj venĝotagon, por konsoli ĉiujn, kiuj estas afliktitaj¹²².

La vera sabato

15:1 Krome pri la sabato estis skribite en la Dek Diroj, per kiuj Li parolis vizaĝo kontraŭ vizaĝo sur la monto Sinaj al Moseo: *Sanktigu la sabaton de la Sinjoro kun manoj puraj kaj koro pura*¹²³. 2 Kaj aliloke Li diras: *Se viaj filoj sanktigos la tagon sabatan, tiam Mi metos Mian kompaton sur ilin*¹²⁴. 3 La sabaton Li ankaŭ mencias ĉe la komenco de la kreo: *Dio kreis en ses tagoj la farojn de Sia mano, kaj en la sepa tago Li finis <tion> kaj ripozis en ĝi kaj benis ĝin*¹²⁵.

4 Atentu, infanoj, kion signifas *Li finis en ses tagoj*. Tio signifas, ke en sesmil jaroj la Sinjoro finos ĉion; ĉar la tago por Li similas al mil jaroj. Mem Li atestas, dirante: *Jen, la tago de la Sinjoro estas kiel mil jaroj*¹²⁶. Tial do, infanoj, en ses tagoj, t. e. en sesmil jaroj, ĉio finiĝos.

5 *Kaj Li ripozis en la sepa tago*. Tio signifas: Kiam Lia Filo venos neniigi la tempon de la malpiulo kaj juĝos la sendiajn kaj ŝanĝos la sunon kaj la lunon kaj la stelojn, tiam Li vere ripozos en la sepa tago.

6 Fine li diras: *Vi sanktigu ĝin kun manoj puraj kaj koro pura*. Se do nun iu povas sanktigi tiun tagon, kiun Dio sanktigis, krom se li estas pura en la koro, tiam ni ĉiel trompiĝis. 7 Rigardu, do: certe ja tiam, en nia ripozo, ni sanktigos ĝin, kiam, mem vere justigitaj kaj jam posedante la promeson, ni kapablos sanktigi ĝin; t. e. kiam ne plu ekzistos malbono kaj la Sinjoro ĉion ja faris nova; tiam ni kapablos sanktigi ĝin, kiam unue mi mem estos sanktigitaj.

¹²² Jesaja 61:1-2.

¹²³ Eliro 20:8; Readmono 5:12.

¹²⁴ Jeremia 17:24-25.

¹²⁵ Genezo 2:1-3.

¹²⁶ Psalmo 90:4; 2 Petro 3:8.

8 Krome li diras al ili: *Viajn novlunojn kaj viajn sabatojn Mi ne eltenas*¹²⁷. Vidu, kiel li diras: Viaj nunaj sabatoj al Mi ne estas akcepteblaj, sed tio, kion Mi faris, en kio ripozigante ĉion Mi faros komenco de la oka tago, tio estas komencon de nova mondo. 9 Tial do ni tenas la okan tagon por ĝojo; la tagon, en kiu Jesuo resurektis el la mortintoj kaj manifestis sin kaj ascendis al la ĉieloj.

La animo de la kristano, vera templo de Dio

16:1 Mi ankoraŭ parolos al vi pri la templo, kiel la kompatindaj <Judoj>, vagante en eraro, metis sian esperon je konstruaĵon, kaj ne je sian Dion mem, kiu kreis ilin, kvazaŭ ĝi estus la domo de Dio. 2 Ĉar preskaŭ laŭ la maniero de la paganoj ili adoris Lin en la templo. Sed kiel parolas la Sinjoro, neniigante ĝin – eksciu tion: *Kiu mezuris per sia mankavo la ĉielon aŭ la teron per sia dikfingro? Ĉu ne Mi? Diras la Sinjoro: La ĉielo estas Mia trono, kaj la tero estas Mia piedbenketo; kiun domon vi do konstruos por Mi, aŭ kio estas la loko de Mia ripozo?*¹²⁸. Vi ja vidas, ke sensenca estas ilia deziro.

3 Krome ree li diras: *Jen, kiuj malkonstruis tiun ĉi templon, tiuj ekkonstruos ĝin denove*¹²⁹. 4 Kaj tio okazas. Ĉar pro ilia militado <la templo> estis neniigita de la malamikoj¹³⁰; sed nun la sklavoj de tiuj malamikoj rekonstruos ĝin¹³¹. 5 Denove fariĝis manifeste, ke la urbo, la templo kaj la popolo de Izrael estis transdonitaj. Ĉar diras la Skribo: *En la lastaj tagoj*

¹²⁷ Jesaja 1:13.

¹²⁸ Jesaja 40:12; Agoj 7:49; Jesaja 66:1.

¹²⁹ Cito ne klara, eble Jesaja 49:17.

¹³⁰ En 70 p. Kr.

¹³¹ Harnack kredas, ke tio ĉi montras la periodon ĉirkaŭ 130 p. Kr., kiam imperiestro Hadriano intencis konstrui sur la neniigita templo de Jerusalemo la novan urbon *Aelia Capitolina* kun templo por Jovo Kapitolino. Tiu plano rezultis en insurekcion de nova Mesio, Simon bar Kōhba, kiu sub gvidado de la famega Rabi Akiba proklamis la Sanktan Militon. Tiu daŭris tri jarojn (132-135) kaj finiĝis per la venko de la Romianoj. Hadriano malpermesis la Judan religion, kaj ordonis, ke Judoj neniam plu rajtos loĝi sur *Aelia Palestina*, la nova nomo de la lando. – La sceno ĉi tie laŭ Harnack temas do pri tiu ĉi historio: la templo estas nun rekonstruata. Aliaj fakuloj tamen ne akceptas tiun ĉi klarigon.

*estos, kaj la Sinjoro transdonos la ŝafojn de Sia paŝtejo kaj ilian barilon kaj turon por forvori ilin*¹³². Kaj tio okazis laŭ tio, kion diris la Sinjoro.

6 Ni serĉu do, ĉu ankoraŭ ekzistas templo de Dio. Ekzistas ja – kie Li mem deklaris fari kaj perfektigi ĝin. Estas ja skribite: *Kaj estos, kiam finiĝos la semajno, ke konstruiĝos la templo de Dio glorie, je la nomo de la Sinjoro*¹³³.

7 Do mi trovas, ke templo ekzistas. Kiel ĝi do estos konstruita je la nomo de la Sinjoro, eksciuj: antaŭ ol ni ekfidis je Dio, la loĝejo de nia koro estis pereema kaj malforta, kiel prave mane konstruita templo, ĉar ĝi estis plena je idolatrio, estis domo de demonoj, ĉar ni faris kio kontraŭis Dion.

8 *Sed ĝi konstruiĝos je la nomo de la Sinjoro.* Atentu do, kiel kiel la templo de Dio glorie estis konstruita. Kiel? Eksciuj ĝin. Kiam ni ricevis pardonon de niaj pekoj kaj ekfidis je la nomo <de la Sinjoro>, ni fariĝis novaj kreaĵoj, nove faritaj dekomence; tial en nia loĝejo vere ekloĝis Dio en ni.

9 Kiel? Lia parolo de la fido, lia voko de la instruo, la saĝeco de la ordonoj, la instruoj de la doktrino, li mem profetanta en ni, li mem loĝanta en ni, malfermanta al ni – sklavigitaj al la morto – la pardonon de la templo, t. e. nian buŝon, donanta al ni pentemon, li enkondukis nin en la nepereeman templon. 10 Tiu ja, kiu deziras saviĝi, rigardas ne la homon, sed tiun, kiu en li ekloĝas kaj parolas, mirigite pri li, ke antaŭe ankoraŭ neniam li aŭdis lin diri tiajn dirojn per la buŝo, nek li mem ankoraŭ sopiris aŭdi tion. Tio estas la spirita templo konstruita por la Sinjoro.

Konkludo

17:1 Kiom estis eble klarigi simple, mia animo esperas, ke nenion mi preteris el tio, kio kontribuas al via saviĝo. 2 Ĉar se pri baldaŭa aŭ pli fora estonto mi parolos, vi ne komprenus, ĉar tia scio kuŝas en paraboloj. Pri ĉi tio sufiĉas do.

¹³² Henoĥ 89:56.66.67.

¹³³ Daniel 9:24-26; Tobias 14:5.

Dua parto de la letero: la du vojoj

18:1 Sed nun ni transiru al alia scio kaj doktrino. Du vojoj estas en la doktrino kaj la potenco, tiu de la lumo kaj tiu de la mallumo. Sed estas granda diferenco inter ambaŭ. Ĉar super unu estas metitaj la lumportaj anĝeloj de Dio, super la alia la anĝeloj de Satano. 2 Kaj unu estas la Sinjoro de eterno ĝis eterno, sed la alia regas pri ĉi tiu nuna tempo de la maljusto.

La vojo de la lumo

19:1 La vojo de la lumo estas jena: se iu deziras iri sian vojon ĝis la planita celo, li bone strebu en siaj agoj. Tial, la scio, kiun ni ricevis por iri laŭ ĝi, estas tia: 2 Vi amos vian Kreinton, vi laŭdos tiun, kiu liberigis vin el la morto; vi estos sincera kore kaj riĉa spirite; vi ne ligiĝos kun tiuj, kiuj promenas en la vojo de la morto, kaj ĉion vi malamos, kio ne plaĉas al Dio, ĉiun hipokritecon vi malamos; la ordonojn de la Sinjoro vi ne perfidos.

3 Vi ne altigos vin mem, sed ĉiurilate vi estos humila; la gloron vi ne akaparos por vi mem. Malbone vi ne juĝos pri via proksimulo, nek permesos ke senpripensu eniru vian animon.

4 Vi ne malĉastos, vi ne adultos, vi ne koruptos knabojn. La parolo de Dio ne eliru de viaj lipoj kun ia malpuro. Vi ne juĝos laŭ personoj se iun vi devos riproĉi la mispaŝojn. Vi estos maldura, vi estos pacema. Vi timtremos pro la diroj, kiujn vi aŭdos. Vi ne memoros malbonon pri via frato.

5 Vi ne estos dubmensa, ĉu io estas ĉu ne. *Vi ne malbonuzos la nomon de la Sinjoro*¹³⁴. Vi amos vian proksimulon pli ol vian animon. Vi ne mortigos infanon abortige¹³⁵, nek ĵus naskiton vi mortigos. Vian manon vi ne deprenos de via filo aŭ de via filino, sed ekde plej juna aĝo vi instruos al ili timon antaŭ Dio.

¹³⁴ Eliro 20:7; Readmono 5:11.

¹³⁵ Traduko ne tute certa.

6 Vi ne deziros, kio apartenas al via proksimulo, nek estos avara. Vi ne ligiĝos anime al fieruloj, sed kun humiluloj kaj justuloj vi interriltos. Okazaĵoj, kiuj trafas vin, vi akceptu kiel bonajn, science, ke sen Dio okazas nenio.

7 Vi ne estos dumensa aŭ dulanga, ĉar kaptilo de la morto estas la dulangeco. Vi submetiĝos al viaj sinjoroj, kiel al bildo de Dio, en modesto kaj timo; vi ne donos akre ordonojn al via sklavo aŭ via sklavino, kiuj esperas je la sama Dio <kiel vi>, por ke ili ne ĉesu timi antaŭ la Dio de ambaŭ; ĉar Li ne venis voki laŭ aspekto¹³⁶, sed tiujn, kiujn la Spirito antaŭdestinis¹³⁷.

8 Vi komunigos ĉion kun via proksimulo kaj nenion vi nomos via propraĵo; ĉar se vi estos partoprenantoj en la nekoruptebla, kiel do <ne> des pli en la pereemaj aferoj? Vi ne estos langorapida; kaptilo de la morto estas ja la buŝo. Kiom vi kapablos, estu anime pura.

9 Ne estu preta elsterĉi la manojn por ekpreni, retenante ilin pri donado. Vi amos *kiel pupilon de la okulo*¹³⁸ ĉiun, kiu diros al vi la parolon de la Sinjoro.

10 Tage kaj nokte vi memoros la Juĝon, kaj ĉiutage vi serĉos la vizaĝojn de la sanktuloj, ĉu penante per la <servo de la> parolo aŭ vojaĝante por admoni ilin, aŭ por pripensi kiel savi ilian animon per la parolo, aŭ laborante per viaj manoj por liberigo de pekoj.

11 Vi ne hezitos doni, nek murmuros doninte; sed vi scios, kiu estos la bona rekompencanto. Vi konservos, kion vi ricevis, *nek aldonante, nek deprenante*¹³⁹. Fine vi malamos la malbonulon. *Vi juĝos juste*¹⁴⁰.

¹³⁶ Efezanoj 6:9.

¹³⁷ Romanoj 8:29-30.

¹³⁸ Psalmo 17:8; Readmono 32:10.

¹³⁹ Readmono 12:32; 1 Korintanoj 11:23; 15:3.

¹⁴⁰ Readmono 1:16; Sentencoj 31:8.

12 Vi ne faros ŝhismon, sed vi pacigos la batalantojn, kunigante ilin. Viajn pekojn vi konfesos. Vi ne iros preĝi kun malbona konscienco. Tio estas la vojo de la lumo.

La vojo de la Obskuro

20:1 Sed la vojo de la obskuro estas kurba, kaj plena je sakrado. Ĉar ĝi estas la vojo de la eterna morto, kun puno, en kio estas ĉio, kio neniigas ilian animon: idolatrio, trofiero, malmodesteco de la potenco, hipokriteco, malsincero, adulto, murdo, rabo, aroganteco, sorĉado, dolo, malico, memkontenteco, venenado, magio, avaro, malrespekto antaŭ Dio.

2 Al tio apartenas ankaŭ la homoj, kiuj persekutas la bonulojn, kiuj malamas la veron, kiuj amas la falson, kiuj ne konas la rekompencan de la justeco, *kiuj ne gluiĝas al la bona*¹⁴¹, kiuj ne kompatas kun juĝo justa pri vidvino aŭ orfo, kiuj ne vigilas en timo antaŭ Dio, sed <rigardas> la malbonon, <homoj> de kiuj mildo kaj pacienco estas longe for; homoj, *kiuj amas vantecon*¹⁴², *kiuj postĉasas profiton*¹⁴³, kiuj estas sen kompto pri povrulo, kaj kiuj ne penadas por helpi iun, kiun superregas la problemoj; ili emas al kalumnio, ili ne konas Tiun, kiu kreis ilin, tiuj murdistoj de infanoj, neniigantoj de la manfaritaĵo de Dio, kiuj furturnas sin de la malriĉuloj, kiuj subpremas la afliktitojn, tiuj advokatoj de riĉuloj, maljustaj juĝistoj pri mizeruloj, tiuj ĉiopekantoj.

Konkludo

21:1 Estas do bone, ke kiu lernis la juĝojn de la Sinjoro, kiom ili estas skribitaj, promenadu laŭ ili. Ĉar kiu obeas ilin, tiu estos glorata en la regno de Dio; sed kiu preferos aliajn aferojn, tiu pereos kune kun siaj agoj. Pro tio la resurekto, pro tio la rekompenco.

¹⁴¹ Romanoj 12:9.

¹⁴² Psalmo 4:2.

¹⁴³ Jesaja 1:23

2 Mi petas vin, kiuj estas eminentaj, se iun konsilon vi pretas akcepti de mia bona intenco: tenu kun vi tiujn, al kiuj vi faras bonon. Ne forlasu ilin. 3 Apuda estas la tago, en kiu pereos ĉio kune kun la Malbona: *Jen venas la Sinjoro kaj Lia rekompenco*¹⁴⁴.

4 Ree kaj ree mi petas vin: Fariĝu bonaj leĝfaristoj unuj por la aliaj, restu fidindaj konsilantoj unuj por la aliaj; forprenu el inter vi ĉiun hipokritecon. 5 Kaj Dio, kiu regas pri la tuta mondo, donu al vi saĝecon, komprenon, inteligentecon kaj scion pri Liaj juĝoj, kaj paciencon.

6 Faru vin lernantoj de Dio, serĉante, kion la Sinjoro petas de vi, kaj faru tion, por ke vi estu trovitaj en la tago de la Juĝo. 7 Kaj se vi havas memoron pri kio estas la bono, meditante pri tio, vi memoru pri mi, por ke same mia deziro kiel mia viglado rezultu en ion bonan. Mi petas vin pri tio, kiel gracon.

8 Ĝis la bona vazo estas ankoraŭ kun vi¹⁴⁵, en nenio vi delasu de ĉio ĉi, sed senĉese serĉu tion, kaj plenumu ĉiun ordonon; ĉar ili estas indaj.

9 Tial des pli mi hastis skribi al vi ĝis servis min mia kapablo por gajigi vin.

Saluton, vi infanoj de amo kaj paco.

La Sinjoro de la gloro kaj de ĉiu graco estu kun via spirito.

¹⁴⁴ Jesaja 40:10.

¹⁴⁵ Eŭfemismo por: dum ankoraŭ vi vivas.